

Juna Esperantisto

Monata Gazeto Beletristika
por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj

Jara abono : 2 fr. 50.

38, rue Lacépède — PARIS — rue Lacépède, 38

VURŜTL⁽¹⁾

De THOMAS.

Senespere la pastro estis foririnta de la obstinulo. Kaj la arestito rekomencis sian unutonan senĉesan marŝadon, de la malhela, per krado fermita fenestro ĝis la malalta pordo — tien reen — tien reen.

Ekstere sonis la paŝoj de l' deploranta gardisto. La avara lumo super la ligna tablo flagris melankolie kaj batalis fantome kontraŭ la mallumo de l' nokto, kiu kuŝis minace buliĝinte en la anguloj de l' malvasta arestejo.

La kondamnito obstine levis la frunton. Ne moliĝi ! Resti fidela al si mem ĝis la plej lasta spiro ! Sinjoro prokuroro ne vane estu nominta lin cinika malestimanto de ĉiuj leĝoj diaj kaj homaj, malica besto, pro kies fleksebla forto kaj sovaĝa ruzo tremis la homoj !

La prokuroro, tiu galoplena, ridinda pigmeo ! Vere amuzis Franciskon Ŝimec, inciti la laman patoson de tiu mizera viraĉo per krudaj rimarkoj kaj gestoj al pli kaj pli fortaj kaprosaltoj. Ĉar, ke li estas perdita, ĉiel perdita, tion li ja sciis ! Malgraŭ ĉia malklereco li ne estis malsaĝa ! Eble pli saĝa, ol la tuta tre saĝa juĝistaro. Kaj ankaŭ pli saĝa, ol lia langlerta advokato, kiu en sensacia parolo kunportis ĉiujn motivojn, eblajn kaj maleblajn, por mildigi la kruelan sangokrimon.

Ĉio sensenca ! Okulon por okulo, denton por dento ! Ke laŭ tiu sentenco plenumiĝos lia sorto, tion li klare vidis tuj de komence.

(1) « Vurŝtl » (kolbasaĉo) signifas por Wien'ano : « arlekeneto ». La vorto estas ankaŭ uzata kiel moknomo por malsaĝuloj aŭ petoluloj.

Tial li restis ankaŭ trankvila kaj malklina, kiam la kondamna juĝo estis dirata. Tial li estis kapabla, males-time grimaci al la komisiitoj, kiuj antaŭ kelke da horoj kun pala soleneco proklamis al li, ke la mortpuno estos plenumata je li dum la matena krepusko.

Do, nun fine finiĝos ! Li sentis nek penton, nek timon ; nur iun kaŝe borantan malpaciencon, ke ankoraŭ kelkaj horoj devos pasi, ĝis kiam la komedio estos finludita. Kaj ankoraŭ io mordis lian sovaĝan koron : obtuza, senforta furiozo, ke li ne povos venĝi sin je tiuj, kiuj lin fine tiel malkuraĝe perfidis !

Ke lia delonga kunulo, Antoĉjo, rifuzis vidi lin ankoraŭ unu fojon, tion li povis toleri, ĉar li sciis, kial tiu singardulo penadis nei ĉiun komunecon kun li. Sed Anna ! Li tiom estis farinta por ŝi, tiom riskinta kaj oferinta por la posedo de ŝia vulgara beleco, ke li atendis almenaŭ iom da fideleco ĝis lia proksima vivofino.

Sed tio daŭris por ŝi tro longan tempon. Kiam lia sorto estis certa, ŝi rapide malplenigis la neston, kiun li estis aranĝinta por ŝi, kaj ŝi forkuris kun alia, al gaja vivado. El la kaŝitaj rimarkoj, la levetoj de ŝultroj kaj la trankviligaj vortoj, per kiuj oni respondis liajn petojn kaj demandojn, tio klariĝis al li iom post iom. Nur Vurŝtl ekzistis ankoraŭ, tiu skabi plena fihundo, kiu iafaje aliĝis al li.

La skabian hundon Anna ne kunirigis sur sia « post-edziniĝa vojo », ĝi do vagis ankoraŭ, por ĉagreno de la domanoj, en la korto kaj antaŭ la pordoj, petante almozojn.

Francisko Ŝimec ekridis tiel akre, ke la arestejestro ĵus eniranta ekstremis, kaj, balancante la kapon, metis la lastan manĝon, kiun la arestito estis dezirinta, sur la tablon. Sed plej mirigita estis la maljunulo, kiam Francisko nun paŝis al li, rapide decidiĝinte, kaj diris al li per rauka voĉo, ke li havas ankoraŭ plej lastan deziron, kiun oni tuj plenumu al li : li volas vidi ankoraŭ unufoje sian hundon Vurŝtl. Li estas sen gepatroj kaj sen amikoj, li havas nenion kaj neniun en la mondo krom tiu besto, li do volas ĝin adiaŭi.

La oficisto ja provis deturni la ekzekutoton de tiu kurioza penso, sed Francisko persistis en sia deziro kun febreca malpacienco, ĝis kiam li fine ricevis la promeson, ke oni plenumos lian strangan peton.

La maljunulo ne estus salutinta tiel afable, elirante, se li ĝuste estus diveninta, kio okazis en la animo de la kondamnito: la hundo, ja, ĝi devis veni al li! Li ja ne tre favoris tiun beston, sed Vurŝtl taŭgis almenaŭ por pasigi al li la tempon per siaj artifikoj. Kaj plue, tiu besto servu al tio, ke Francisko Ŝimec ankoraŭ unufoje povu deklari al la tuta mondo tutan sian venenan mokon, sian malestimon al la morto! Kiam ili elirigos lin, li donacos la fihundon al la ekzekutisto kun ŝerca vorto memoraje, aŭ, li ankaŭ povos «testamente» postlasi ĝin solene al la prokuroro, aŭ — ho, li certe elpensos ankoraŭ iun teruran sercon, kiu indignos la homojn, tiun popolaĉon, tiun malamatan de li, malkuraĝan, malsaĝan bandon!

Kiu ja estis kulpa pri lia mizera sorto krom la homoj? Sian patrinon, kiu lin naskis, sian patron li ne konis, ili jam post lia naskiĝo hontinde estis perfidintaj lin kaj forpuŝintaj. El la trovitejo li estis transdonita al iu zorganto sur la kamparo. Mirinde estas, ke li tie ne mortis pro malsato! Kaj malsatante, frostremante, ŝtelante, malestimate, malbenate kaj batate li kreskis, ĝis kiam oni transdonis lin al majstro kiel metilernanton. Tiam komenciĝis lia plej terura vivo. Turmentata, eluzata kaj ekstreme malbone traktata de la ebria majstro kaj de malafablegaj submajstroj, li lernis malami la homojn pli kaj pli intense. Tiam okazis lia unua krimo, piko per tranĉilo, farita kun blinda furiozo, kiu surterigis la plej kruelan el liaj turmentistoj. La malliberejo kaj la kunuloj, kun kiuj li tie konatiĝis, ja akcelis la malhonestajn instinktojn de lia animo, kaj baldaŭ sekvis novaj krimoj kaj novaj punoj. Inter ŝtelistoj, ŝtelkaŝistoj kaj aliaj friponoj li ĝuis la reakiritan liberecon. Sed li estis pli forta kaj pli kuraĝa, ol tiuj kanajloj, kaj tial li malestimis ilin ne malpli ol la fierulojn, la justulojn, kiuj starigis kontraŭ li siajn leĝojn. Enfunde la homoj ŝajnis al li ĉiuj same malestimindaj, ĉu ili fanfaronis en plena lumo, aŭ ŝteliris flanke sur mal-lumaj vojoj. Kun tiuj kaj kun ĉi tiuj li havis nenion komunan; li estis sola, tute sola, unu kontraŭ ĉiuj!

Anna estis la ununura, pri kiu li pensis pli bone, kaj nun ĝuste ŝi estis plej malnoble perfidinta lin!

Kiom ajn malbonhumora kaj malmolkora li estis, li subite sentis la senliman izolecon, kiu ĉirkaŭkrampas lin

kiel metala ringo, la mizeregon, kiu el nenies ajn okuloj eligas unu larmon.

Eble eĉ la hundo jam ne aliros lin! Li ja ĉiam sufiĉe malbone traktis ĝin, kaj la besto jam de monatoj ne vidis lin. Efektive, ne estus mirinde, se Vurŝtl retirigus de li, subtirinte la voston. Kaj tamen, tiu penso ekstremigis la solulon kaj liaj rigardoj vagis pli kaj pli maltrankvile al la pordo de la arestejo, kvazaŭ li jam ne povus atendi ĝis kiam li vidos la hirtharan kunulon ŝtelenirantan humile, balancante la voston.

Turmente malrapide pasis la tempo. Subite la arestito eksaltis, ĉar rapidaj paŝoj proksimiĝis kaj samtempe liaj akraj oreloj ekaŭdis mallaŭtan plorbojadon. Jes, estis ĝi, lia Vurŝtl!

Post kelke da momentoj la besto kun mallonga raŭka ĝojsono forŝiris sin de la kondukintoj kaj jetegis sin per granda salto al sia mastro. Kun furioza karesemo ĝi penadis suprensalti je li kaj dancis ĉirkaŭ li per petolegaj saltoj.

Mirante Francisko rigardis malsupren al la hundo kaj silente li toleris, ke tiu kun ripetiĝanta ĝojebrio lekis, plorbojante kaj la voston balancante, lian malsupre pendantan manon. Sed, kiam la fidelulo eksaltis, murmurbojante pro la tintado de la ree ŝlosata pordo kaj, nudiginte la dentaron, pretigis sin por atente gardestari antaŭ la enirejo de la arestejo, jen rapida rideto glitis sur la trajtoj de l' kondamnito kaj li vokis al si la hundon kaj lasis spacon al ĝi sur la mallarĝa ligna benko, flanke de si.

« Bona Vurŝtl, ĉu vi tiom min amas? » li diris mallaŭte kaj karesis la kapon kaj la malgrasajn flankojn de la besto, kiu — ne kutimigita al tiaj dolotoj — fleksis sin kun brilantaj okuloj al la brusto de sia mastro.

Kaj inter homo kaj besto komenciĝis stranga dialogo, interŝanĝo de rigardoj, unuopaj vortoj, sonoj kaj senonaj gestoj, dialogo tre bone komprenata de ili ambaŭ, malgraŭ ĉia mallerteco.

« Kompatinda, fidela kreitaĵo, vi nun restos senprotekte lasita al via sorto! Vi vere meritis pli da bono pro mi! Jen, prenu de mia manĝo de ekzekutoto, kiu supozeble estos la lasta ankaŭ por vi! »

Kaj Vurŝtl ekkaptis la donitajn al li pecojn rapide, sed senatente, kaj ĝi tuj denove metis la kapon sur brakon

de sia mastro, kvazaŭ dironte : « Kiom mi zorgas pri ĉio, nun, estante denove ĉe vi ! »

Francisko Ŝimec penseme apogis la kapon per mano : Do, tamen iu aŭ io amis lin pro li mem ! Kiome tio bon-sentigis ! Subite io varmega supreniĝis en liajn okulojn kaj li volonte farus kelkajn farojn nefaritajn. Estis, kvazaŭ da pralumo, kiu beligas la mondon, gajigas la homojn kaj vivindigas la vivon, mallarĝa strio ŝtelirus en la mal-luman arestejon kaj dolĉe ĉirkaŭludus la frunton de l' sen-paculo. Io estis vekita en lia koro, kion li ankoraŭ ne perceptis kaj kio tamen estis tiom potenca, ke ĉio cetera ĉirkaŭ li malaperis kaj ke li eĉ ne rimarkis, kiam la pordo estis malfermata kaj iu altulo mallaŭte eniris.

« Mi venis ankoraŭ unu, lastan, fojon », diris kvieta voĉo. « Repaciĝu kun la mondo kaj elpetu la favoron de l' Ĉiopova, antaŭ kies vizaĝon vi estas paŝonta. »

Surprizite la alparolito rigardis supren kaj rekonis la pastron, kiun li jam unufoje moke estis rifuzinta. Tuj la pli frua obstineco estis releviĝonta, sed kiam li vidis, ke Vurŝtl tute paceme saltas malsupren de sia sidejo kaj kun certa instinkto priflaras la fremdan homon konfide kaj afable balancante la voston, li ne povis diri malbonan, krudan vorton.

« Pastra moŝto », fine li diris malrapide, « vi vere devas havi bonan intencon pri mi, ĉar alie mia sola kaj plej bona amiko, Vurŝtl, ne alirus vin tiamaniere ! » Kaj hezitante li aldiris : « Nun mi konfesas, pastra moŝto, ke pli frue mi estis treege malprava, kaj mi esperas, ke vi pardonos min. . . »

La pastro paŝis al la arestito kaj afable metis sian manon sur lian ŝultron. Li komprenis, ke la horo de kon-vertiĝo estis veninta por obstina animo kaj li utiligis ĝin por sia grava ofico. Kun bonkoreco kaj per saĝa pardon-emo li longatempe kaj pacience insistis al la perditio, ĝis kiam tiu iom post iom volonte malŝlosis la fermuran ŝrankon de sia koro.

La konfeso ja estis tre neordinara ; komence preskaŭ nur ekĝemoj, tiam sovaĝa korbatalo, akuzoj kaj malespero, sed la pastro ĉiam saĝe kaj certe redirektis la muĝantan torenton en la ĝustan fluejon, ĝis kiam la ondoj fine mal-grandigis en maro de profunda, malfalsa pentio.

Vurŝtl dume sidadis respektplene iom malproksime kaj atente observis ambaŭ virojn, sed kiam ajn la pastro trankviligante aŭ benante metis la manon sur la kapon de l' kondamnitro, la hirthara vosto de l' hundo akre vipis la plankon.

Post kiam Francisko Ŝimec estis absolvita kaj kisinta la manon de l' animpaŝtisto, tiu karesis la kapon de la altrudiĝanta hundo kaj promesis emociite, ke li fidele prizorgos la beston. La unua malvarma lumo de l' mateno estis vekiginta kaj oni venis por konduki la ekzekutoton sur lia lasta vojo.

Jen, Vurŝtl bataleme kaj kuraĝe ĝis morto volis interjeti sin; sed kiam ĝia mastro ĝin avertis kaj kviete lasis ligi siajn manojn post la dorso, ankaŭ Vurŝtl toleris, ke iu fremda viro lin zorge kondukis per ŝnuro.

Forta kaj malklina Francisko Ŝimec sekvis la antaŭirantan pastron, sed, pasante, li klinis sin rapide kaj premis unu kison sur la buŝon de l' hundo.

Kaj Vurŝtl sidigis sur la malantaŭaj kruroj kaj staris silente kaj rektiĝinte kiel soldato, kiu honore salutas sian eksigantan komandanton. . . .

Tradukis JOH. SCHRÖDER.

= En la septembra numero de « La Revuo » oni legas la sekvantan « novaĵon »:

« Ni ĵus ekscias, ke Pastro Giovanni Martino Schleyer, aŭtoro de *Volapük*, ĵus mortis en Constanza (Svisujo). » . . .

Nu, tiu ĉi komunikaĵo de « La Revuo » estas korektota jene:

1) anstataŭ « Giovanni » oni metu « *Johann* » aŭ « *Johano* » (1);
2) anstataŭ « mortis » oni metu « *festis sian okdek-jaran naskiĝotagon* »;

3) anstataŭ « Constanza » oni metu « *Konstanĉ* »;

4) anstataŭ « Svisujo » oni metu « *Germanujo* ».

Krom tiuj ĉi eraroj la komunikaĵo de « La Revuo » estas tute ĝusta.

Nia glora Majstro, D-ro Zamenhof, en sia malferma parolado ĉe la Sepa Kongreso Esperantista en Antwerpen (21. Aŭg. 1911) tre simpatie parolis pri la maljuna Prelato Schleyer, nomante lin « la patro de la internacilingva movado », esprimante por li siajn koregajn bondezirojn. Ni ankaŭ sincere aliĝas al la paroloj de nia Majstro, dezirante ĉion bonan al la brava, talenta aŭtoro de *Volapük*, kaj ni tutkore deziras, ke la suprecitita komunikaĵo de « La Revuo » ankoraŭ dum longa tempo ne estu vera!

(1) Laŭ nia opinio, ne estas dece, ke germanon, en esperanta gazeto, aperanta en Francujo, oni nomu — itale.

DEZIRO DE LA DIAKONO

Novelo, de SERGIO MARTOS.

Fino. — (Vidu la komencon en la antaia numero.)

Do, jen li jam revenis, — kaj en la domon eniris, dum ni pri li kaj pri la edzino rakontis.

Li estis altkreska homo, fortika, ŝultrelarĝa, en nigra talaro longa, kun nigra densa barbo, kun granda nazo ruĝa kiel papavo.... Rigardinte sur lin, oni tuj povus diri, ke li estas homo nekuraĝa, kiel oni diras — malenergia. Nur tiuĉifoje sur liaj lipoj ludis ia rideto kaj la okuloj rigardis iel strange kaj hele.

— Bonan vesperon al vi! — laŭte diris li, enirante.

Eŭdokio Gerasimovna ekstremis, levis sian kapon kaj diris:

— Ha, vagulo! kial ci tiel malfruiĝis? Kie vi lasis la ĉevalinon? Ĉu ci ĝin maljungis?

Je tiu ne tre afabla renkonto la diakono gaje respondis:

— He, nu kial do demandi pri la ĉevalino! Kompreneble, la ĉevalinon mi maljungis kaj starigis ĝin en tiun « ejaĉon », kiu al ĝi konvenas. Pri io pli interesa oni povas rakonti! Estas aliaj aferoj, sed ne « la ĉevalino »!...

La diakonedzino ekrigardis la edzon kaj kvankam li, ĉirkaŭrigardante, tute fikse sin tenis sur la piedoj, ŝi ion suspektis — kaj respondis:

— Mi jam vidas, kiajn « aferojn »! Mi vidas, ke ci jam hodiaŭ ie eksorbis « monopolon! »⁽¹⁾

— He, kio « monopolo! » tio ĉi estas parolo senenhava!... Povas esti, ke mi « malaperigis » da pokaletto, — ĉar mi havas ĝojon grandan!⁽²⁾

La diakonedzino, mirante, aŭskultis la edzon.

— Sidiĝu do kaj rakontu kunsence. Ĉu ci volas manĝegi? Do, Ksenio donu, — diris la diakonedzino. Ksenio metis manĝaĵon antaŭ la patron. Li eksorbis iom kaj komencis rakonti:

— Jen vidu, elektita mia Eŭdonjo, hodiaŭ matene mi iras tra la urbo; jen renkonten al mi venas servisto en konservatorio, mia konatulo, Simeon Ignatoviĉ kaj sciigas al mi tiun ĝojon, pri kiu mi parolis al vi.

— Diru do jam, ne turmentu min, Herodo! — diris la diakonedzino, kaj ŝi eĉ kraĉis.

— Nu atentu do, aŭskultu! — daŭrigis la diakono; — Simeon Ignatoviĉ sciigis min, ke al mi, al mia propra persono, estas donata alta oficeblo de ĥorestro kaj kantadinstruisto ĉe nia lernejo,

(1) Tiel ukrainanoj nomas brandon.

(2) Ukrainanoj drinkas « jen pro malĝojo, jen pro ĝojo...! » Trad.

kaj por tiuj penoj kaj okupado al mi trafas decinda rekompenco, — 120 spesmiloj jare! ho! kaŭze de tiu ĝojo ni kun Simeon Ignatoviĉ nin direktis al la patro prioro kaj tie mi ricevis tiun mian oficonon. Ricevinte, mi kun Simeon, jen nome, priverŝis la novan oficonon... Ne estas do eble ne drinkigi lin — ĉe tia afero! — Poste, parolante kaŭze de tiu ĉi afero, ni decidis, ke ellernadi tian altan sciencon de nia lernejo kiel kantado, ne estus eble — havante ĉe si apude nenian muzikilon, por doni tonon, je kiu oni devas ekkanti. Kaj por tio ni iris muzikvend-ejon.

La diakonedzino enŝoviĝis, piedfrapis kaj ekkriis:

— Por kio, por kio do vin tien ĝi pelis?

— Ho Dio, rememoru caron Davidon kaj tutan kvietecon lian!... Atentu, atentu, elektita edzino, ne flamiĝu kaj ne krii!... Tie ni por 85 spesmiloj aĉetis « fis-harmonion », ⁽¹⁾ kun poparta pago tutjara! Jen do, tiun « fis-harmonion » mi alveturigis kun mi: ĝi estas tie, en la korto.

— Kion? kion? Ho, Herodo!... por 85 spesmiloj aĉetis ian « vost-harmonion »? Ĉu ci freneziĝis, aŭ kio? — Tiel kriis la diakonedzino kaj kun pugnoj sin ĵetis al la edzo.

La diakono pala nur svingis la manojn kaj murmuris:

— Ho, Dio rememoru caron Davidon...

— Ci « vost-harmonion » aĉetis! — kriis la diakonedzino. — Do, ci al kroĉu voston al vi!

— Lasu, Eŭdonjo! — reparolis la diakono, — vosto estas distingilo de besto senparola, kaj de spirito de malboneco; sed mi, laŭ favoro Dia, estas homo, kaj laŭ bonfavoro de nia Potenculo apartenas al la diservistaro preĝeja; kaj tiun apartenaĵon mi ne havas.

— Ksenio, donu la hakilon! Kie do estas tiu « vost-harmonio »? — kriaĉis la diakonedzino. — Mi iros ĝin dishaki!

La diakono senĉese ekstremis: li tuta kurbigis, manoj liaj tremis. La diakonedzino kriis, piedfrapis, eĉ la haroj malordigis.

— Ho, Dio!... murmuris la diakono.

— Ksenio, kie estas la hakilo? — ĉiam kriis la diakonedzino, — mi diras do al ci, ke mi iros dishaki tiun malbenitan « vost-harmonion »! — La diakonedzino kuradis en la ĉambro, simile al kato dum brulego; ekfaletis je malgranda benketo kaj preskaŭ falis; ŝi koleriĝis ankoraŭ plie, kaptis la benketon kaj ĵetis ĝin kontraŭ Andronik Polikarpoviĉ.

— Herodo! — kriis ŝi; — 85 spesmiloj!!... la infanoj estas ĉifonvestitaj, por la vintro ne estas je kio aĉeti fojnjon, kaj

(1) « Fis-harmonio » = Harmoniumo. Mi intence tiel tradukas, ĉar tiel estas necese por la pluo....

li tian monon por tia malsaĝajo elspezas ! frenezigiĝis ci ? malsaĝigiĝis ? he ? kie estas tiu « vost-harmonio » ? mi iros ĝin dishaki ! kie ĝi estas ?

La diakono paliĝis kaj per iu stranga voĉo eldiris :

— Ĝi staras tie sur la ĉaro, sub la stalo ; se vi volas pagi per unu fojo 85 spesmilojn, do iru dishaki ĝin....

— Nu, se ci volas, — diris denove la diakonedzino, — ke mi ne dishaku ĝin, kaj ke mi ne batu cin, morgaŭ frumatene eĉ la spirito ne restu de tiu malbenita « vost-harmonio » en nia korto ! Forveturigu ĝin morgaŭ, ĝis ĝi kaj cia kapo estas sendifektaj !

Ĉe tiuj vortoj la diakonedzino sensuiĝis, senvestiĝis kaj kuŝiĝis sur sian liton por dormi, malfacile spirante, oh-ante kaj renversigante de flanko al flanko ; sed ekspiris ŝi ne longe, ĉar la insultado al la edzo lacigis ŝin kaj baldaŭ ekdormis.

Kaj la kompatinda Andronik Polikarpoviĉ, klininte la kapon, faris cigaredon kaj sopirante fumis ĝin. Poste li prenis kusenon, jetis sur la kanapon, deprenis la botojn kaj subtalaron, estingis la lampeton kaj trifoje pie farinte krucoŝignon, ankaŭ kuŝiĝis.

Estis post la noktomezo.... Ĉio silentis, ĉiuj ekdormis. Ne dormis nur Andronik Polikarpoviĉ : li ĉiam renversigis de flanko al flanko ; jen malfacile ekspiris, jen li oscedis kaj faris krucoŝignon, mallaŭte dirante ; « Rememoru Dio »... longtempe ŝoviĝis Andronik Polikarpoviĉ, trapensante multe da io.

Ekrigardinte tra la fenestron, ekvidis li, ke ekstere jam tagiĝas. Tiam li leviĝis, piedvestiĝis, surmetis la subtalaron, eliris en la kuirejon, sin lavis super la elverŝajujo, ordigis la harojn, surmetis ĉapelon kaj eliris eksteren.

Dio ! Kiel bonè estis la printempa frumateno ! Sur la ne-mezurebla ĉielo, ĉirkaŭŝutita de la mano de Kreinto per la helaj steletoj, ne estis eĉ nubeto.... Steletoj, unu post la alia, estingiĝis.... Per ruĝa strio komencis heliĝi tiu rando de la ĉielo, de kie estis aperonta hela kaj varma la suno. En la herbejo per arĝentaj ondoj estis leviĝanta supren la nebulo. Sur la altaj poptoj, sur la florantaj ĉerizujoj, sur la odora levistiko (1) kaj sur la malgranda herbetaro brilis per arĝentaj perloj rosoguto. Kaj najtingaloj en la herbejo, en la florantaj ĝardenetoj pepdroniĝas, kvazaŭ volante superkanti unu la alian. Ili per siaj kantoj kvazaŭ sendis saluton renkonten al la suno hela. Tie kukuas kukolo, tie pego per longa beko frapas arbon. Jen malgranda kaj vigla hirundino portas jen plumeton, jen herbeton por pli rapide fini sian varman kaj fortikan nesteton, kiun ĝi konstruis sub la tegmento de la diakona dometo. En la korto rastas kokinoj kaj koko, surfluginte la sentegmentan porkejon, svinginteflugilojn tiel ekkukorikis, ke tra la ĝardeno resonu fluis.

(1) Latine : Levisticum officinale.

Post la vilaĝo sur la paŝtejon oni pelis ŝafaron kaj bovinojn...

La diakono staris sur la perono, fumis cigaredon enpensinta. En la dometo tiutempe eliris Ksenio kaj ekpelis la bovinojn sur la paŝtejon.

Ekknaris la pordego. Nur tiam rekonsciiĝis Andronik Polikarpoviĉ.

— Ho, Dio... — diris li kaj malrapide iris en la stalon, tie sur la ĉaro, kovrita per krudtolaĵo kaj per malnova subtalaro, kuŝis io simila al kofro. Tio ja estas la « fis-harmonio »...

Depreninte la talaron kaj krudtolaĵon, la diakono starigis ĝin, kiel decas, rigardis ĝin ĉirkaŭe, malfermis la muzikilon kaj komencis provi tonojn. Li sortimentis verson de « Kerubkanto », « Favoro de paco »... Poste mallaŭte ekaŭdiĝis ia simpla kanto, ĉu « Ekblankiĝis la neĝoj », ĉu « Ne riproĉu min, mia patrino », sed tiel malĝoje sonis tiuj tonoj, fluis mallaŭte kvazaŭ larmoj... Poste la diakono gardeme fermis la harmoniumon kaj genuen malleviĝis antaŭ ĝi sur la ĉaro, klininte sur ĝin la kapon. Koron lian mordetis sopiro, la kapo doloris, tiel de sendorma nokto, kiel de pensoj...

Ĉu longtempe li tiel staris, li ja mem ne sciis... Li ne aŭdis, kiam malfermiĝis la pordo, kiam el la domo sur la peronon eliris Monjo kaj Steĉjo.

— Paĉjo! Pro kio vi tiel staras? kvazaŭ vin iu genuen starigis! — demandis Monjo.

— Ho, Dio!... — diris la diakono kaj foriris el la ĉaro. Stariginte kaj kovrinte denove la « fis-harmonion », li komencis ŝmiri la ĉaron.

— Atendu do, ne forveturu! — ekaŭdiĝis voĉo de Eŭdokio Gerasimovna. — Mi donos al ci ion el la legomoj, ke ci vendu ĝin en la bazaro. Kaj rigardu do, ne fordrinku!

La lipoj de la diakono kurbiĝis, kvazaŭ ili volis kunmetiĝi en maldolĉan rideton. Jen li jungis la ĉevalinon kaj metis iom da fojno en la ĉaron...

La diakonedzino kaj Monjo alportis kaj metis sur la ĉaron du malgrandajn korbetojn.

— Jen ĉi tie, — diris la diakonedzino, — fasketoj da maja rafaneto, juna ajlo kaj bulbo, salato, fenkolo kaj petroselo; kaj jen estas duonsupujo da butero. Nu, veturu do kaj memoru!...

Malfermiĝis la pordego en la preĝeja korto, kaj la diakono elveturis el la korto, klininte la kapon kaj lasinte la ĉevalinon malrapide iri.

— Memoru do! — aŭdiĝis al li sekven.

Veturis Andronik Polikarpoviĉ klininte la kapon kaj pensis

pri tio, ke ne konformiĝis kun efektiveco ĉiuj liaj pensoj, ĉiuj liaj deziroj... Li pensis pri la maldolĉa vivo en sia hejmo, kie li estis mastro sen volo kaj sen favoro... Li pensis pri Eŭdokio Gerasimovna, ĉiam kolerema kaj malsanema, pri ŝia karaktero, tute alia ol por li estas bezonata... Veturis li nenion vidanta... Li aŭdis nek la gajajn pepadojn de la birdetoj, nek la kantojn najtingalajn, li vidis nek la altan sekalaron, kiu kvazaŭ verda maro etendiĝis sur la senlima kampo, kaj pensis siajn pensojn, du larmoj mallaŭtaj ruliĝis tra liaj vangoj kaj per argentaj perloj brilis kontraŭ la suno sur lia nigra barbo. Koro lia estis maltrankvila kaj ne rimarkis li, kiam li estis alveturinta la urbon. Li veturis rekte al la bazaro, disvendis siajn legomojn kaj buteron, por si lasinte du fasketojn da rafaneto kaj iom da butero; aĉetis li duonon da pano kaj duonkvarton da brando... Forveturigis la fis-harmonion kaj pro malĝojo komencis « almetiĝi » al la boteló. Ekdrinkinte kaj plifortiginte sin per la rafaneto kun butero, li iom forgesis sian Eŭdonjon kaj ŝiajn instrukciojn. Lia koro iom mildiĝis.

— « Malaperigu mi » ĝis la fino, — diris li al si mem, — ĉar « vino gajigas koron homan! » — Kaj li komencis « serĉi » la fundon de l' botelo...

— Nun ŝi insultu! — diris li. — Estas bezone preni ankoraŭ unu por la dumvojiro, ĉar povas okazi, ke mi renkontos la baptonon Afenogenon. Renkontiĝis al li la baptono kaj iuj aliaj amikoj, dronigis ili en botelojn la tutan legomaron kaj buteron, kiujn donis por vendi Eŭdokio Gerasimovna, dronigis ili ankaŭ la malĝojajn kaj malgajajn, kaj ekdiboĉis ili ĝis la vespero mem!...

Apenaŭ movante la langon diris nia diakono:

— Pardonu al mi, Dio, pekojn miajn kaj defendu min kontraŭ la krueleco kaj furiozo de kunvivantino mia!...

Pruntepreninte de la baptono duonspesmilon da mono, li aĉetis por la dumvojiro ankoraŭ unu botelon da brando kaj, ŝanceligante la kapon, li diris:

— Aspergu min per la hisopo kaj mi repuriĝos... Rememoru Dio caron Davidon kaj rezignacion lian!...

— Nnno, Margarito, — ekbatis li per ba ileto la ĉevalinon; — veturu ni hejmen, por doni respondon! Amata filino Ksenio, kiel filino de Jafeo, malfermos la pordegon de la hejmo kaj renkontos « kun tamburinoj kaj cimbaloj »... Kaj Eŭdonjo kion?... do obstina Eŭdonjo kion?... ŝi kion?... ŝi renkontos — kaj ek-ludos sur la kordoj de animo mia!... He-e!... pli ol amaso da malagrablaĵo ne estos!... Nnno, Margarito!...

Vesperigis... En la preĝeja korto, apud la perono ludis la malpliagaj infanoj de la diakono; la diakonedzino, Ksenio kaj Monjo, nemalproksime de la domo, ion sarkis sur la bedoj.

— Tprrru!... ekaŭdiĝis apud la pordego. — Amataj infanoj miaj! Malfermu pordegon de hejmo mia!

Ĝi estis la diakono. Sed estis aŭdate, ke lango lia ne tre lin obeas....

Ksenio kuris kaj malfermis la pordegon.

La korton enveturis la ĉaro; sur ĝi sidis Andronik Polikarpoviĉ; — sur la genuoj liaj kuŝis ĉapelo kaj en la ĉapelo estis malplena botelo de brando, pecetoj da pano kaj fasko da rafaneto ĉirkaŭmangita. Sur la piedojn, super la botoj, estis survestitaj la korbetoj.

Ekvidinte tion, Eŭdokio Gerasimovna preskaŭ falis de la teruro kaj furiozo.

— Kio ĝi estas?! de kie ci...?! —

— Ho, batalema vojevodo!... mi... mi... — diris la diakono kaj ŝvingis la manon, kaj el ĝi falis batileto. — Ne bru... ne bru... je mi... Mi... estis... ĉe enterigo... Mi enter... igis... mortis... — apenaŭ eldiris ladiakono, per neobeema lango.

— Ĉe kia enterigo? Kiun oni enterigis? Kiu mortis? — kriis la diakonedzino.

— Mortis... la «fis-harmonio»... Mi enterigis miajn pensojn... miajn dezirojn... kiujn mi amis kiel miajn proprajn infanojn!...

Kaj diakono Bogodannij ekploris maldolĉe, maldolĉe....

El la ukraina lingvo tradukis ANATOL KOH.



VELOJ KAJ PENSOJ

En la vasta, blua, senmezura maro
Ofte, dum la vento, bruas la ondaro....
Sed la tim', lasinte al fiksita celo,
Naĝas laŭ la ondoj velo post la velo....
Tiel el animo, dum la viva vojo,
Dum feliĉo dolĉa, aŭ dum la malĝojo,
En vastegan spacon de la Universo
Flugas al la steloj penso post la penso.

Aleksandro Martakov.

VAGANTOJ

La herooj de ĉi tiu aventuro estas vagantoj.

Unu estis tre alta kaj maldika ; lia kamarado nomis lin « cikonio ». La kunulo estis, kontraŭe, malgranda kaj larĝa. Li havis ruĝajn harojn kaj grandan, kurban nazon, kiu estis bele ruĝa, zigzage brilanta per bluaj makuloj. La longulo nomis lin « fabo ». Ambaŭ estis fervoraj amantoj de la naturo, kaj somere preferis vojaĝadon.

Foje, dum varmega julia tago, kiam oni ĉie rikoltis grenojn, pasis ĉi tiuj individuoj tra unu vilaĝo en la suda parto de Bohemujo. Meze de la komunumo diris la malgrandulo :

« He, cikonio, mi malsatas jam kiel lupo, ni eniru ĉi tiun bienon, eble ni ricevos ion por manĝi. »

« Mi dubas, fabo, ne estas ankoraŭ tagmezo ; la mastrumistino verŝajne ne havas tagmanĝon pretan. Mi provos ; se mi nenion ricevos en la kuirejo, forportu vi almenaŭ ian legomon de malantaŭe. »

Tiam ili ambaŭ eniris la pordegon. Longulo iris rekte en la koridoron de l' loĝdomo, kaj lia kunulo, ĉirkaŭirinte la loĝejon, eniris la ĝardenon. Unua, trairinte la vestiblon, ekvidis sur unu ŝranko en niĉo tre bonodorantan paton, enhavantan ion flavan. Li longigis sin pli alten, ekprenis fulmrapide la paton, kaŝis ĝin sub sian surtuton, kaj silente paŝis for de la bieno. Lia kamarado, elŝirinte en la ĝardeno kelke da rafanoj, elkuris baldaŭ post li. Supre ĉe la arbaro ili kunvenis. La malgrandulo, kiu tuj de malsupre ekkonis, ke lia kunulo hodiaŭ estis pli feliĉa, ol li mem, vokis serene :

« Ho, cikonio, hodiaŭ ni fartos bonege, kiel estas evidente ! Ci estas efektive tre sprita ; ne vane estas, ke ci havas cikoniajn piedojn. »

Tiam ambaŭ sidiĝis kaj festenis.

« Tiu vilaĝanino estas precipe lerta kuiristino, ĉu ne vere, fabo ? »

« Kompreneble, la rulkukaĵo bongustas ; sed plej bonaj estas la sekvinberoj. »

« Aŭdu, cikonio, mi scias, kiel okazis... ŝi metis la paton en la vestiblo sur ŝrankon por malvarmiĝi, kaj ci trovis ĝin tie. »

« Ci divenis, fabo ; se mi tiel alten ne vidus, ni havus nun nur ciajn rafanojn. La kuirejon mi eĉ ne eniris ; la mastrumistino certe estus min sendinta sur la kampon por rikolti grenojn, kaj mi svenus tie pro varmego. »

« Cikonio ! »

« Kio okazis, fabo ? »

« Mi vidas iun alveni. »

« Ne estas eble ; oni ja ne sonorigis ankoraŭ tagmezon. »

« Vidu, cikonio, ke mi ne eraras ; ĉu ci estas miopa ? »

« Ha, vere, mi jam vidas. Estas nia ekskamarado. Nu, atendu, vulpulo, ci baldaŭ estos bone regalata !... Estu silenta kaj ne ridu, fabo ; ni trompos lin, — jen bona okazo lin puni pro lia iama perfido ! »

Dume proksimiĝis la vidito pli kaj pli, fine li alvenis kaj sidiĝis inter la du vagantoj. La pato estis, krom kelke da eraj restaĵoj, jam preskaŭ malplenigita, sed malgraŭ tio ĝi gustis bonege al la noveveninto.

« Nu, manĝu, kamarado », instigis lin la longulo ; « la rulkukaĵo estas tre bongusta. Ni ĝin ja honeste kaj malfacile elgajnis ; ĉu ne vere, fabo ? »

« Kompreneble. Mi pensis jam, ke mi kraĉos sangon pro la penadego, kaj cikonio dufoje svenis. »

« Dum la tuta frumateno kaj antaŭtagmezo ni devis rikolti grenojn, por kio la mastrumistino donis al ni krom tiu ĉi rulkukaĵo nenion », rakontis kolerŝajnige la longulo.

« Ci, fabo, portu la paton al la mastrumistino, kaj postulu de ŝi kruĉon da biero. Mi soifas, kiel kamelo. »

« Kion ci pensas, ci, cikonio ? mi estas laca kiel jungĉevalo ! Ja jen estas nia gasto ; li tien alkuros, li scias pli bone sin esprimi ol mi, — ĉu ne vere, kamarado ? »

« Do, bone, amikoj, mi iros tien, ĉar vi estas tiel senfortiĝintaj, kaj vi vidos, ke mi alportos plenan kruĉon », respondis servoprete la noveveninto.

Tiam li leviĝis, kaj iris rapide al la vilaĝo, tenante la paton en la mano. Ambaŭ regalintoj rigardis post lin. Jam vidis lin transiri la vilaĝplacon, poste eniri la pordegon. — Sed kia surprizo ! Momente atakis lin kelke da personoj per bastonoj kaj batis senkompate lian dorson. Li mem, ĵetinte la paton al la kapo de unu el la batantoj, elkuris el la korto eksteren, kaj ekminacinte per la pugno direkte al la arbaro, kuregis malsupren al la rivero.

JEAN BALLEY.



FELIETONO

La vizito de la inspektoro.

Inspektoro vizitas la malliberejon de la urbo Anaskamp. Li ekfrapas la pordon de la kontoro. Homo vestita je blanka bluzo, tenante ŝlosilojn en la mano, malfermas la pordon kaj diras : « Kion vi deziras, sinjoro ? »

— Mi deziras paroli kun la direktoro de la malliberejo, respondas la inspektoro.

— Li ne estas tie ĉi.

— Do, la subdirektoro, kie li estas ?

— Li estas en la kafejo.

— Kaj la gardistoj ? ĉu ili ne estas tie ĉi ?

— Ne, ili ankaŭ estas en la kafejo kun la subdirektoro.

— Kia administrado ! estas tre bela administrado en tiu ĉi urbo, ho jes ! Ke la diablo enportu ilin ! . . . Kaj vi, kiu vi estas ? — daŭrigas la inspektoro per tondra voĉo.

— Mi, — respondas tre trankvile la homo, — mi ne estas samspeculo, mi devas resti tie ĉi, ĉar mi estas malliberulo.

Laŭmemore tradukis P. JULES DE LÉNGYEL.

Sur fervojo.

En kupeo sidis du sinjoroj : la unua, maljuna sinjoro, — kaj la dua, juna sinjoro. La junulo estis pli parolema kaj li demandis la maljunulon :

— Kien vi vojaĝas ?

— *Zsolna'n.*

La vizaĝo de la junulo tuj eksereniĝis.

— Nu, mi havas tie bonan maljunan kamaradon. Foje bonegan vesperon ni pasigis kune en *Nyitra*. Neniam mi tiel bonege amuziĝis.

— Vere ? Kiu estas tiu ?

— La tiea notario.

La maljunulo malkomforte moviĝadis sur sia loko, poste kun kaŝita ĉagreno li diris :

— Bone. La tiea notario *mi* estas.

La junulo embarase senkulpigis sin :

— Ĉu vere ? Nu certe . . . mi havas malbonan memoron, mi ne scias en mia rememoro konservi vizaĝfigurojn.

La afero pasis, kaj kiam la vagonaro jam proksimiĝis al la celo, la maljuna sinjoro prenis siajn pakaĵojn kaj trankvile parolis al la junulo :

— Vi do loĝas en Nyitra ?

— Jes.

— Mi havas tie amikon. Vera amuzemulo, gaja knabo li estas.

Mi tre amas lin. Transdonu al li mian saluton.

— Ho, tre volonte. Kaj kiel li nomiĝas ?

— Vilhelmo C...

Nun la junulo komencis malkomforte moviĝadi kaj li respondis :

— Jes ? Tiu ja mi estas.

El hungara tradukis TÓTH VINCE.

BIBLIOGRAFIO

La eldonantoj, kiuj deziras, ke ni raportu pri iliaj eldonaĵoj, estas petataj ĉiam sendi donace al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.

Du Rakontoj de A. ČEŤOV, tradukis B. KOTZIN. Rusa Biblioteko N^o 2. 32 p. 11 × 18. — Moskva Librejo « Esperanto », 26, Tverskaja, Moskvo. Prezo : 10 kop. (0,10 Sm.).

La legantoj de « Lingvo Internacia » memoras ankoraŭ la du strangatemajn rakontojn « Veto » kaj « Ĉi volas dormi », kiujn oni nun ricevas en aparta broŝuro. La nomoj de la glora aŭtoro kaj de la bone konata, Fundamento-fidela tradukinto estas la plej bona reklamo por tiu leginda libreto.

La Prediko sur la Monto, tradukis el la originala greka teksto Pastro JOHN BEVERIDGE. 16 p. 9 × 12. — British Esperanto Association, 133-6, High Holborn, London W. C. Prezo : 8 Sd.

Enhavas la predikon de Jesuo sur la monto, al tie kolektiginta homamaso kaj disciploj (Mateo, ĉ. 5, 6 kaj 7).

Tagigo, kanto esperantista. Poezio de ANTONI GRABOWSKI, muziko de BARANSKI. 2 p. 18 × 24. — Varsovio, Jan Günter. Prezo : 10 Sd.

Agrabla muziko kun la bela teksto verkita de nia fama Akademiano kaj kunlaboranto, kiun ĉarman poezion jam ĝue legis la legantoj de « Lingvo Internacia ».

Konkordanco al la Krestomatio, verkita de J. C. O'CONNOR, Ph. Dr., M. A., kaj C. F. HAYES. 24 p. 9 × 13. — Pionira Librejo Esperanta, 135, Sellincourt Road, London S. W. Prezo : 0,13 Sm.

Unua parto, enhavanta la participojn.

Sufero, de CARMEN SYLVA, eldonigis Prof. D-ro Siegf. Lederer. 102 p. 11 × 16. — Heckners Verlag, Wolfenbüttel (Germanujo). Prezo : 0,80 M. (0,40 Sm.).

Enhavas la originalan germanan tekston de la aŭtorino (Elisabeth, reĝino de Rumanujo), kun esperanta kaj alilingvaj tradukoj el la esperanta teksto : angla, franca, hispana, itala, pola kaj rumana.

Konsilaro por la farado de la Sciencaj kaj Teknikaj Vortoj. 78 p. 18 × 27. — H. F. Adolf Thalwitzer, Kötzschenbroda-Dresden (Germanujo). Prezo : 0,75 Sm.

Raporto starigita de la Scienca kaj Teknika Komisiono de l' Internacia Scienca Asocio Esperantista (direktoro : S-ro Rollet de l'Isle).

Rakonto kaj Aventuro. 32 p. 10 × 15. — American Esperantist Company, Washington (D. C.), Usono.

La libreto, kiu portas ŝajne ne allogan titolon, enhavas du rakontetojn tre interesajn, kun esperanta temo. Ili estas : « Sur la batal-kampo », de Herschel S. Hall, kaj « La aviadisto de Marso », de Henry H. Barroll.

Ostlorn. Vilaĝaj skizoj, de S. ULFERS, el holanda lingvo tradukis M. J. WESSEL. 303 p. 15 × 21. — D. Van Sijn & Zoon, Rotterdam. Prezo : broŝurita, 1,65 Sm. (2 guldenoj); bindita, 2,05 Sm. (2,50 g.).

Kun plezuro ni atentigas niajn legantojn je ĉi tiu bonega libro. En Holando kaj Germanujo ĝi ripete estas represita, tradukoj en aliaj lingvoj jam aperis kaj baldaŭ aperos. Ni do ne dubas, ke ankaŭ la esperantistoj bone akceptos tiun ĉi belan verkon.

La Reĝo de la Ora Rivero, aŭ *La Nigraj Fratoj*, de JOHN RUSKIN, tradukis IVY KELLERMANN. Esp. Bibl. Int. N° 18. 48 p. 10 × 15. — Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin S. W., Lindenstrasse 18-19. Prezo : 0,10 Sm.

Leginda, ĉarma rakonto, varme rekomendinda precipe al junuloj.

Patro Nia, religia kanto, esp. vortoj de D-ro L. L. ZAMENHOF, muziko de MANILIUS HERBIG. 6 p. 24 × 30. — Germana Esperanto-Librojo, Leipzig. Prezo : M. 1,50 (Sm. 0,75).

La muzikamantoj kun sincera ĝojo akceptos tiun ĉi belan muzikverkon, kiu estas verkita kun akompano de fortepiano (aŭ orgeno).

La malsanulo pro imago, komedio en tri aktoj, de MOLIÈRE, el franca lingvo tradukita de Rektoro W. VELTEN. 100 p. 10 × 14. — Deutsche Esperanto-Buchhandlung, Leipzig. Prezo : 0,20 Sm.

La legantoj certe kun ĝojo salutos la ĉiekonatan verkon de la glora Molière en nia literaturo. La belaspekta broŝuro formas la V-VI-an kajeron de la « Internacia Librotrezoro ».

La Turisto kun la verda Stelo, de O. VAN SCHOOR. 8 p. 13 × 21. — Centra Esperantista Belga Oficejo, Vondelstraat, 20, Antwerpen. Prezo : 40 centimoj (0,16 Sm.).

Amuza monologo, celanta propagandon de Esperanto.

Elektitaj poemoj de Petöfi, tradukis D-ro EUGENO FUCHS. 55 p. 10 × 15. — Eldono de la tradukinto (advokato en Mátészalka, Hungarujo). Prezo : 80 heleroj (0,32 Sm.).

Estas neeble tufidele traduki alilingven la poemojn de la glora Petöfi, pro ilia pure hungareca lingvaĵo; tamen D-ro Fuchs klopodis kiel eble pleje alproksimigi lian stilon en sia traduko, pro kio li estas gratulinda.

Piccolo Manuale della lingua internazionale ausiliaria neutra Esperanto, trad. E. Fasce. 32 p. 10 × 15. — Propaganda Esperanto Eldonejo, 4, via D. Chiossone, Genova. Prezo : 10 centimoj.

Itala traduko de la franca « ruĝa broŝuro ».

Esperantista gvidlibro en Rouen. 107 p. 9,5 × 13,5. — Rouen, 41, rue de la Vicométe. Prezo : 60 centimoj (0,25 Sm.).

Ne nur vojaĝantoj, sed ĉiu plezure legos tiun ĉi interesan libreton por pliriĉigi siajn konojn per ĝiaj priskriboj kaj ilustraĵoj.

Esperanta gvidlibro tra Bosnio kaj Hercegovino, 34 p. 13 × 19. — **Ključ Esperanta** (kroata ŝlosilo), 36 p. 7 × 11. — Eldonaĵoj de « La Stelo Bosnia », en Sarajevo.

« La Stelo Bosnia » vendas la belan, lukse presitan kaj riĉe ilustritan *gvidlibron* kaj sendas ĝin afrankite en la regionojn de la universala poŝtunuigo laŭ jenaj prezoj : 1 ekz. 50 heleroj (55 centimoj), 46 pfenigoj, 2 internaciaj respondkuponoj; — kaj la *ŝlosilo* : 1 ekz. 5 h. (5 c., 5 pf.); por 2 internaciaj respondkuponoj 10 ekz. afrankite.

PEDAGOGIA FAKO

Jesuo aŭ Jezuo? (Responde al « Amiko ».) — Neniu el tiuj ĉi vortoj estas ankoraŭ oficiale akceptita, la elekto estas do allasata al la esperantista publiko. La latina originala vorto estas « *Jesus* », kiun ĝiatempo oni versajne elparolis « *Jezus* ». Ekzistas latindevenaj vortoj

en la Universala Vortaro, kiuj estas *fonetike*, kun ζ skribataj, anstataŭ *s* de la latina originalo, ekz. *kaŝo*, *kaŝeo*, *roŝo* (lat. *casus*, *caseus*, *rosa*); *kuŝo*, *valiŝo* (france: *cousin*, *valise*); samon ni vidas en multaj internaciaj vortoj esperantigitaj (*baŝo*, *fiziŝo*, *filozofiŝo*, *inkviziciŝo*), precipe en grekdevenaj, en kiuj respiegulas la greka ζ . Aliparte, en kelkaj naciaj lingvoj fonetikaj oni uzas la literon ζ (pole: *Jézus*, hungare: *Jézus*), — kaj en aliaj, nefonetikaj lingvoj, la uzata *s* elparoliĝas kiel ζ (franca, germana, k. t. p.).

Fine, la vortformo « Jezuo », unuavide, ŝajnas pli logika, ol « Jesuo », ankaŭ tial, ĉar en la Akademia Vortaro troviĝas la radiko « *jezuit* », kiu estas samdevena kun « *Jezu* », kaj, pro tio, ĝi devus esti samortografia. Sed tiaspeca malsameco ekzistas ankaŭ en naciaj lingvoj, kiel ekz. ruse: *Иисусъ* — *еяуитъ*, hungare: *Jézus* — *jezsuita* (elp. Jézuŝ — jejuita). Eĉ en Esperanto mem ni trovas malsamradikajn vortojn samdevenajn: cifero — deĉifri, kuŝi — kuseno, komisii — komitati — komizo; reĝo — rojalisto, nigra — negro, k. t. p., — tiu argumento ne povas do esti konsiderata kiel nepra aŭ absoluta.

En la plejmulto de lingvoj oni uzas la literon *s*, kaj en kelkaj ĝi estas elparolata kiel la esperanta *s* (hisp. *Jesús* elp. Ĥesus). Cetere, la vortformo « *Jesuo* » jam estas tiel *generale uzata* en Esperanto, ke nun, ŝanĝi tiun forte enradikiĝintan vorton, estus danĝere. Mi, mia parte, preferas uzadi la formon « *Jesuo* », komune uzatan kaj kutiman en nia lingvo, troveblan en ĉiu vortaro, inter ili en tiu de nia Majstro.

La deklaro de D-ro Zamenhof, kiun li eldiris en sia Lingva Respondo pri la nomoj de landoj; devas esti aplikata ĉiam kaj ĉie, sed precipe pri propraj nomoj: «... la tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur interkonsento, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco; oferi la unuan al la dua mi konsilus nur en tia okazo, se nia Lingva Komitato tion postulus ».

P. DE L.

HUMORAĴOJ

Grava profesio. — Infanoj ludas « je lernejo ». Unu estas instruisto, la dua — kateĥisto, kaj la ceteraj estas lernantoj. Inter ili estas bubeto, kiu neniam ankoraŭ iris en lernejon, kaj li obstine volis ankaŭ ricevi iun funkcion, sed la aliaj kontraŭstaris. Fine la plej maljuna el ili decidis jene: « Nu, vi do estos inspektoro. »

Astronomio. — *Profesoro*: Kio estas aerolito? — *Lernanto*: Aerolito estas marsipa kuŝejo. — *Profesoro* (mirigita): Kiel? marsipa kuŝejo? — *Lernanto* (konvinkige): Jes, tre klare: pendanta *lito*, balanciganta en la *aero*.

Fenomenaĵo. — Sur la kamparo, oni manĝas sub arboj. Subite, botelo, kvazaŭ falanta el la ĉielo, terurigas la manĝantojn.

— Jen, — ekkrias unu el ili, — *aerolito!*

Stranga titolo. — En la Reĝa Palaco, je fino de melodijaĵo ludita de militista muzikistaro, amato sin turnas al muzikisto:

— Bonvolu diri al mi, kiun muzikpecon vi ĵus ludis.

La muzikisto, komplezeme, konsultinte sian programkartonon:

— Estas la numero 9, sinjoro....

« **Tri okoj** ». — Sinjoro S....., kiu havas vere eksterordinaran apetiton, deklaras esti partiano, li ankaŭ, de l' « tri okoj », kaj tiel dispartigas la tagon : « Ok horoj por dormi, ok horoj por ripozi kaj ok horoj por... manĝi. »

Trafa demando. — Patro Jus riproĉis sian filon pro mensogo. — « Sciu, mia filo, ke, kiam mi estis tiel malgranda, kiel vi, mia patro neniam riproĉis min pro mensogo, ĉar mi ne mensogis. »

La filo : Kiam do vi komencis ?

Malkompreno. — Ludoviko, la lakeo, tranĉarangas sian kalon per la razilo de sia mastro. La mastro lin surprizas je tiu agado.

— Kiel ! — li krias kolere, — vi havas la kuragon tranĉi vian kalon per mia razilo ! Kia malmimo !

— Vere, mi ne timas, sinjoro. Tre lerte mi faras ĝin ; estu tute trankvila, mi ne tranĉvundos mian piedon.

Inter kuracistoj. — « Mia malsanulo resaniĝis. » — “ Vi do estas pli feliĉa, ol mi ; la mia mortis kaj ankoraŭ ne pagis. ”

Okazkapte. — La edzo eklegas iun libron. Post kelkaj minutoj li formetas ĝin kun enuo. Li prenas ĵurnalon ; ĝin li ankaŭ formetas enue.

— Nenia bona legaĵo, — li plendas. — Min tedas tiuj fuŝaj romanoj, abomenaj gazetoj. Ho, kiel volonte mi legus ion interesantan, emociantan, entuziasmigan, ekscitantan...

— Ekscitantan ? — interrompas la edzino. — Jen do, karulo, legu tiun ĉi fakturon pri mia nova ĉapelo.

Ĉe la tagmanĝo. — *Gasto* : Kiel bona tagmanĝo ! mi ja ne manĝas same ĉiutage ! — *La bubo* : Kaj ni ankaŭ ne !

Inter surdmutoj. — Du surdmutaj amikoj interbabilas, — per surdmutaj fingrosignoj, kompreneble.

— Vi havas, — diras la unua, — strangan ŝvelvundon sur via vizaĝo. De kio ĝi fariĝis ?

— Hieraŭ vespere, — respondas la alia, — kiam mi revenis hejmen el la drinkejo, mia edzino tro laŭte *parolis* al mi.

Ne konas lin. — « Ĉu vi konas la *Barbiron de Sevilla* ? » — “ Ne, mi ne konas lin ; mi min razas mem. ”

Ĉe ekzameno. — *Instruisto* : Rakontu al mi, kion vi scias pri la familio de la moluskoj. — *Lernanto* : Mi ne rajtas tion fari ; miaj gepatroj severe malpermesis al mi rakonti ion ajn pri familio de aliaj.

Rekonigilo. — « Viaj dunaskitaj filinoj, Vilnjo kaj Luinjo, estas nedistingeble similaj unu al la alia. Per kio vi tamen rekonas ilin ? » — “ Ho, ekzistas ia diferenco inter ili : Vilnjo estas malpli simila, ol Luinjo. ”

Ĉe fervojstacia kaso. — *Vojaĝonto* : Bonvolu doni al mi vojaĝbiletan triaklasan. — *Kasistino* : Kien ? — *Vojaĝonto* : Nu, tien ĉi, en mian manon.

Kompetenteco. — Mia kara edzo, — diras sinjorino Zorgiel al sia edzo dum la matenmanĝo, — hodiaŭ tagmeze, kiam vi estos revenanta hejmen el via oficejo, bonvolu trapasi la kuirvendejon kaj aĉeti unu vivantan porkidon.

La dekjara filino Lucino interrompas :

— Estus pli bone, kara patrino, se vi mem irus aĉeti ĝin. Patro ne estas kompetenta pri tio, li ne bone konas la nutraĵojn. Oni certe trompus ĝin ; oni vendus al ian *maljunan* porkidon.

Du vaguloj. — *Nelaboroviĉ* : Diru, kolego, ĉu vi kutimas labori dimanĉojn ? — *Mallaborowski* : Dimanĉojn ? ... Ne. Mi ja havas nenian motivon fari escepton por dimanĉoj.



NIĀJ KONKURSOJ

Kutime ni donas ĉe ĉiu konkurso du premiojn al la partoprenantoj de niaj konkursoj, t. e. 1) el libroj eldonitaj de Presa Esperantista Societo, en valoro de 2 \$, — 2) samon en valoro de 1 \$, — laŭ elekto de la premiotoj.

Jen kelkaj respondoj ricevitaj pri nia aprila konkurso :

*Tra la kara kaj amata
Vasta ava, patra land'
Jam paŝadas la am' frata,
Falas jam malpaca band'. (Voloŝin.)*

Pala angl', afabla franc', gastama arab', gaja alpan', paca dan', grandbarba kanadan', sana flamand', blankhara saks', flavavanga japan', brava alban', armajamanta dalmat', bavara abat', tatara han, laca kamparan', sata magnat', vanta dand' kaj avara graf' pasas tra la plac', paŝadas tra la strat', dancas, saltas, falas, baraktas kaj haltas, car' kaj saĥ' rajdas, la granda amas' kantas kaj gajas, la karnavalflag' vagas kaj la karnavalfajr' flagras. (De tiu sama.)

Gaja kamaradamas', malsamrasa karavan' (skarlatstandarda Angl', brava Dan', artama Franc', grandbarba Bavar', rajdanta Arab', flavavanga Japan' kaj lanhara, platnaza Kafr') alpaŝas tra arbar' al agrabla laga rand', kantas, manklakas, balfaras, dancas, paradas, naĝas, baraktas, atakas kaj bataladas. (F-ino Odette Meyer.)

Post ok horoj nokto kovros mondon, homoj dormos. — Fajfas fajl' kaj balancas kaj falas karb'. — Fil' finis min insisti, li kisis min. — Mallarĝa varma strat' pasas tra val'. — Granda, larĝa, plata plac' plaĉas al Maks'. (Leon Horowitc.)

Pri idistvizitint' li diris : mi ilin vidis. — La amata kaj afabla patr' trapasas kaj alnaĝas al la granda, larĝa kanal'. (S-ino M. Meylan-Mairet.)

Malgranda akar' rampas tra la larĝa arbar'. — Jen entrepren' de ĉefkelner'. — Mi vidis ilin imiti nin. — Domzorgonto forŝovos ok komodojn. — Nu, junul', ludu tuj kun unu murmurul' ! (L. Müller.)

Horoskopo honoros homojn. . . . — Ekstrema bel-esper', je regn' verd-stel' en ter' ! — Noblkor', sono donos forton por zorgoj, dolĉgojon por orfoj. (A. St. Reiner.)

Li igis min diri : mi sciis pri ĝi. (Blondulino.)

Doktoro Otto do provokos Joĉjon. (F-ino Otilia Istre.)

Li timis min sidigi. (Ivan Probojĉević.)

Mi disirigis ilin. (Joh. Kovács.)

Partoprenis en la konkurso ankaŭ : Aglido, Tiburcio Alonso, G. Bauer, S. M. Bauer, Maurice Brezin, Ch. Dembriet, M. Eisler, Ph. Ellbogen, Albert Fahrner, F-ino Th. Fentey, Fuŝproblemisto (4 resp.), J. González, F-ino L. Hall, E. Haucke, Max Jahn, Karolino, Alfredo Keele, S-ino Kirney (2 resp.), F-ino A. Latour, S-ino Lina Lemberger, M. Lindner, Francisco López, Mevido, Molnár Gyula, Rud. Oesterreicher, M. Paulniez, G. Peterson, F-ino Rose Petitjean, Jakobo Pirkner, Emile kaj Marcel Prasier, F-ino V. Proksch, Pupinjo, Lud. Rauschenberger, E. Richter, W. Ringbauer, Rululo, Karl Sauter, Serĉulo, Skarabido, Herm. Sorg, Al. Stoll, Ant. Studer, M. Szentesy, Tamburisto, A. Teodoroviĉ (2 resp.), F-ino Ch. Toller, Vilaĝano, Hans Wollner.

Ni rememorigas niajn legantojn, ke la templimo de nia julia konkurso estas la 1-a de Oktobro 1911.

Korespondado de la Redakcio.

L. H. — Tiaspecaj gazetoj esperantistaj ne ekzistas, sed « La Movado » (31, boulevard Saint-Marcel, Paris) enhavas rubriketon pri aviado. La demandita terminaro estas aĉetebla ĉe ni; prezo : 75 centimoj.

En bruo de l'vanto. — La bela poezio estas nebone prilaborita kaj neĝuste versigita, ni do ne povas ĝin presi.